

**Jarraporto de la TEJO-estraro kaj –
komisiitoj
2015/2016**



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando
www.tejo.org

Kompilita kaj redaktita de Arina Osipova, Ĝenerala Sekretario de TEJO
Roterdamo, la 31-a de aŭgusto 2016

Enhavo
Enkonduko
Administrado
Financoj
Adoleska agado
Aktivula trejnado
 2015
 2016
Edukado
Eksteraj rilatoj
 2015
 2016
Homaj rimedoj
Informado
 Informiloj
 Nova servilo
 TEJO-aktuale
Kongresoj
 IJK 2106
 IJK 2017
Landa agado
 Landa agado en Ameriko
 Landa agado en Eŭropo
Merkatiko
Moviĝeblo
Pasporta Servo
 2015
 2016
Scienca kaj faka agado
Oficistoj
Volontuloj
Mallongigoj

Enkonduko

raportas Michael Boris Mandirola, prezidanto

La jena raporto prezentas al vi la agadon de TEJO ekde la pasinta Internacia Junulara Kongreso okazinta en Visbadeno kie la Komitato elektis ĉi tiun Estraron kadre de nekutime vigla kaj neantaŭvidebla kunsido. Multa laboro estis farita kvankam evidente la intenseco de la laboro ne estas sama en la diversaj agadkampoj.

En tiu ĉi unua jaro estis granda fokuso al struktura kresko:

- Finance: TEJO brile subtenatas de Erasmus+; inter la du IJK-j estis aljuĝitaj subvencioj sumante pli ol 260.000,00€;
- Jure: iuflanke UEA reformas sian membrosistemon donante abundan eblecon por senpaga aŭ malmultekosta membreco, aliflanke renovigo de nia statuto, regularoj kaj reglamentoj estas grava paŝo kiu ne nur povas finfine porti TEJOn al plena jura memstareco sed enkondukas plurajn ŝanĝojn kiuj igas nian organizon pli kohera kun la leĝo, kun la nuntempo kaj kun la konkretaj bezonoj de TEJO;
- Stabe: antaŭ unu jaro TEJO ne havis oficistojn (malgraŭ ke estis jam aljuĝita subvencipeto tiucela) kaj estis nur unu volontulo en la CO; nun ni havas unu plentempan kaj du duontempajn oficistojn, du volontulojn en la CO kaj ekde septembro 4.

Ni volas ke en la komenciĝonta dua jaro de nia mandato, la spertiĝo de la Estraranoj (plejparte en sia unua mandato) kaj la struktura fortiĝo ebligos pli multan kaj pli ampleksan agadon de la organizo, aparte en tiuj fakoj kie la progresoj estis malpli videblaj, kaj reakcelon en la atingo de la celoj en nia Strategia Plano.

Administrado

raportas Arina Osipova, ĝenerala sekretario

En la 71-a IJK (Visbadeno, Germanio) la Komitato de TEJO elektis novan Estraron, kiu ekde tiu periodo konsistas el kvin personoj:

- Michael Boris Mandirola - prezidanto, eksteraj rilatoj, aktivula trejnado;
- Arina Osipova - ĝenerala sekretario, edukado kaj kongresoj;
- Cédric Marchal - kasisto, financoj, subvencipetado, moviĝeblo, merkatico;
- Juliana Evandro - vicprezidanto, informado, kulturo, homaj rimedoj, adoleska agado, Pasporta Servo;
- Ariadna García Gutiérrez – landa agado, scienca kaj faka agado.

La dujara oficperiodo de la nuna Estraro finiĝos en la 73-a IJK en Afriko. La novan Estraron elektos la Komitato.

Ekde la 71-a IJK okazis du estraraj kunvenoj: en Roterdamo, Nederlando (novembro 2015) kaj en Novaro, Italio (marto 2016). En la cetera tempo la Estraro ĉiumonate dufoje kunvenis rete kaj tiamaniere traktis aktualajn temojn kaj planis plej proksimajn agadojn.

En 2015 la Komitato konsistis el 48 personoj: 38 komitatanoj A (nomumitaj de la landaj kaj fakaj sekcioj), 3 komitatanoj B (elektitaj de la individuaj membroj), 2 komitatanoj C (elektita de la komitatanoj A kaj B) kaj 5 estraranoj. Ekde la komenco de junio 2016 ekas nova oficperiodo de la Komitato kiu daŭros ĝis la fino de majo 2018.

Laŭ la reglamento ĉiu komitatano devas membri en almenaŭ unu komisiono de TEJO. En 2015-2016 aperis du novaj komisionoj pri Moviĝebloj kaj pri Merkatico.

Nun ekzistas 12 komisionoj:

- Komisiono pri Adoleska Agado
- Komisiono pri Aktivula Trejnado
- Komisiono pri Edukado
- Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
- Komisiono pri Homaj Rimedoj
- Komisiono pri Informado
- Komisiono pri Kulturo
- Komisiono pri Landa Agado
- Komisiono pri Merkatico
- Komisiono pri Moviĝebloj
- Komisiono pri Pasporta Servo

· **Komisiono pri Scienca kaj Faka Agado**

En decembro 2015 sian volontuladon finas Paweł Fischer-Kotowski (Pollando). Ekde tiu tempo kiel volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo kiel TEJO-volontulo deĵoras Jérémie Bert (Francio) kaj januare 2016 alvenis dua volontulo Michal Matúšov (KuboF), Slovakio. Kune kun la volontuloj multan laboron plenumas du oficistoj – en oktobro 2015 por tiu posteno estis elektita Mounir Abijou (Maroko) kaj en januaro 2016 Uriel Gudián (Nikaragvo), kiu laboras duontempe.

La aktivuloj de TEJO – estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, volontuloj kaj oficistoj – regule raportas pri siaj agadoj. Iliaj raportoj aperas en la formo de la monata cirkulero, dissendata pere de la komitata diskutlisto. Ĉiuj arkivaj numeroj estas legeblaj ĉe la paĝaro de TEJO <http://tejo.org/dokumentoj-kategorio/cirkuleroj/> kaj en Trello.

Financoj

ne raportis Cédric Marchal, kasisto

Subvencioj

raportas Michael Boris Mandirola, prezidanto

La pasintaj monatoj por TEJO estis tre sukcesaj laŭ subvencia vidpunkto. Eŭropa Volontula Servo kreis subvencian kadron por TEJO-volontulado en la Centra Oficejo.

- Dum tuta 2015 efektiviĝis la projekto *Springboard to the world* (7575,00€) danke al kiu volontulis Paweł Fischer-Kotowski.

- Nia estraro ankaŭ heredis la duan aprobitan projekton *Springboard to the world* (18167,32€). La komence planitaj volontuloj rezignis sed ni sukcesis trovi aliajn kaj dume deĵoras Jérémie Bert kaj Michal Matúšov (KuboF Hromoslav) dum unu jaro ĝis januaro 2016.

- En februaro estis sendita la projekto “*Gateway to a United World*” (9083,66€) kiu estis aprobita kaj ekde septembro volontulos Lucy Mears.

- En aprilo estis sendita la projekto “*Building a bridge to unity*”, ankaŭ ĝi estis aprobita kaj ekde septembro voontulos Alessandro Bonfanti.

Kadre de Erasmus+, estas ankaŭ administra subvencio kiu celas doni rimedojn por la normala funkciado de la organizo. En la jaro 2015 ni ricevis administran subvencion por 1 plentempa oficisto kaj 3 statutaj eventoj (1 komitatkunsido kaj 2 estrarkunsidoj) por sume 19,499.00€. Ni decidis subvencipeti por 2016 por 1 plentempa kaj 1 duontempa oficisto kaj 4 statutaj eventoj (1 komitatkunsido kaj 3 estrarkunsidoj); ankaŭ tiu ĉi subvencio estis akceptita kaj por tio TEJO ricevis 27558,00€.

Estas tamen problemoj pri la raportado de la administra subvencio 2015, kiuj estus multe pli facile eviteblaj se atento al la kondiĉoj kaj la postuloj estus donata tuj je la ricevo de la subvencipeto kaj ne nur en la lasta parto de la jaro. Ni atendas nun la finan reeĥon fare de EACEA.

Alia speco da projektoj estas strategiaj partneradoj en kampo de junularo en kiuj TEJO partneras kun siaj landaj sekcioj kaj aliaj organizoj al ili proksimaj:

- Dum la IJK en Visbadeno komenciĝis la projekto “*ETEY - Empower Trainers, Empower Youth!*” (58845,00€) kiu finiĝos dum al IJK en Vroclavo kun la celo krei la unuan generacion da TEJO-trejnistoj.

- TEJO ankaŭ celis partneradon pri alekstera komunikado. Post la du malsukcesoj en 2015, TEJO prezentis la projekton, “*ECY - Effective Communication for Youth*” en februaro, ĝi ricevis “pozitivan malaprobbon” kaj resendita laŭ la reeĥoj estis ĵus aprobita (59645,00€).

La plej konata atingo estas tamen la subvencio je 142490,00€ pri Eŭrop-Afrika kunlaboro, ĝi estis unafoje sendita en septembro, malakceptita kaj duan fojon en februaro. En majo ĝi estis aprobita en kiu partoprenas 4 landajn sekciojn de TEJO el Eŭropo kaj 4 el Afriko kaj kiu estos kerna por la organizado de IJK en Afriko.

Same kadre de kapablokonstruado en kampo de junularo, nia oficisto verkis projekton inter eŭropaj kaj amerikaj organizoj donante la ŝancon ankaŭ al niaj amerikaj landaj sekcioj partopreni tiajn projektojn. Ni atendas la rezulton dum venontaj monatoj.

Ekster la kadro de Erasmus+, bedaŭrinde pro vizaj kialoj TEJO devis rezigni pri subvencio je 2500,00€ por venigi du afrikajn esperantistojn al Eŭropo dum la jaro 2015 cele al ilia spertiĝo perspektive al Afrika IJK, Estis alikadre esploritaj diversaj subvencifontoj kaj kelkaj subvencipetoj estis ekverkitaj sed momente ne estis senditaj aliaj projektoj.

Resume la subvencipetoj de TEJO estis ofte sukcesaj, kaj ni esperas ke tio ne nur solvas la financon de TEJO kiu havis malhelan perspektivon antaŭ nur 2-3 jaro, sed ankaŭ rezultiĝas en tre kvalitaj projektoj en pluraj agadkampoj de niaj organizo.

Adoleska agado

raportas Juliana Evandro, respondeca estrarano

Bedaŭrinde, en la komisiono pri adoleska agado preskaŭ nenio okazis. Unu el la plej gravaj planoj estas la starigo de la multiretejo formato de tejo.org, sed bedaŭrinde tio ĝis nun ne konkretiĝis.

Dum JES en Eger, la komisiito Tobiasz Kubiszowski kreis kaj gvidis inter la adoleskuloj la ludon *Ludecigo*, kiu celis instigi la partoprenantojn poenti laŭ aktivado en la programo de la evento. La sama projekto nun estas planata por IJK 2016 en Vroclavo.

Aktivula trejnado

raportas Michael Boris Mandirola, respondeca estrarano

2015

Ekde IJK nova komisiito respondecis pri aktivula trejnado, Alejandro Escobedo Muñoz.

Dum la IJK en Wiesbaden multo okazis pri aktivula trejnado, ja tie okazis trejnado “Fotu Mojose!” kadre de AMO-seminario. Tie ankaŭ okazis la unua kunsido rilata al ETEY, junulara Erasmus+strategipartnerado celanta krei trejnistojn.

Same kadre de ETEY, dum la Kultura Postsomera Semajnfino en Heerlen, okazis trejnado pri KvalitCertigo de NeFormala Edukado kunlabore kun Forumo Junulara Eŭropa. La sperto ne estis entuziasmiga kaj efektive tia seminario devus nur kun spertaj trejnistoj kaj ne kun homoj kiuj ĵus proksimiĝas al la temo.

Fine de la jaro estis lanĉita konsultado pri la plej trejnindaj temoj por prepari pri ili la ontajn projektojn. Dume estis senditaj kelkaj subvencipetoj por kelkaj projektoj kiuj enhavos aktivulan trejnadon sed ili ne estis akceptitaj.

Neniu nova reta trejnado estis kreita, tamen 5 homoj finis la enkondukan rettrejnadon de TEJO-KER.

2016

En la nova jaro Alejandro iom deflankiĝis de la agado pri AT.

La fokuso de TEJO en aktivula trejnado estis pri la projekto ETEY, junulara Erasmus+strategipartnerado celanta krei trejnistojn. 17 TEJO-anoj partoprenis intensegan seminarion en marto dum la Internacia Junulara Festivalo en Pesaro kaj nun rete laboras antaŭ la dua parto de la julia seminario en Vroclavo kadre de la IJK.

La trejnadprogramon gvidas trejnistoj el BEST (*Board of European Students of Technology*) kiu estas unu el la junularaj organizoj kun plej granda trejnosperto en Eŭropo.

Neniu nova reta trejnado estis kreita, tamen la rettrejnadon TEJO-KER estis abunde uzita por prepari la aktivulojn kiujn partoprenis Eŭropan Junularan Okazaĵon en Strasburgo. 19 homoj finis la enkondukan kaj 1 homo finis la spertiĝantan.

Dume estis senditaj kelkaj subvencipetoj por diversaj projektoj kiuj enhavos aktivulan trejnadon sed momente neniu projekto ankoraŭ ekis.

La komisiono pri Aktivula Trejnado do dormetis sed la malmulto kio okazis estas metanta la bazojn por krei finfine la TEJO-trejnistaron kaj havi estontece ege pli abunde da trejnadaj liveritaj rekte en Esperanto.

Edukado

raportas Arina Osipova, respondeca estrarano

En 2015 estis elektita nova komisiito Karina Oliveiro (Brazilo). Pro fino de studado ŝi apenaŭ havas multe da tempo por okupiĝi pri Edukado. Tamen kiel studentino de Interlingvistikaj Studoj Karina okupiĝas pri disvastigo de informo pri Instruista Trejnado en Poznano, kiu okazos en 2016-2017. Ankaŭ Karina skribis artikolon pri Duonlingvo por Kontakto. Fakte tio estis resumo de ŝia prelego dum la Kongreso en Brazilo. Video de la prelego estas disponebla en la jena ligilo:

<https://www.youtube.com/watch?v=V3P5wLO8-RE>

Bedaŭrinde nuntempe la komisiono ne vere aktivas. Tamen estas planita vojaĝo de la nuna TEJO-volontulo Michal Matúšov (KuboF) al la 49-a ILEI-Konferenco en Nyíregyháza (Hungario) cele plibonigi rilatojn kun ILEI kaj preparoli la ontajn kunlaborajn planojn.

TEJO plue premias siajn individuajn membrojn, kiuj trapasas la ekzamenon je nivelo C1 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Ĉiuj premiitoj sukcese trapasis la ekzamenon.

Eksteraj rilatoj

raportas Michael Boris Mandirola, respondeca estrarano

Eksteraj rilatoj konfirmiĝas kiel grava kaj aktiva agadkampo de TEJO dekoj da aktivuloj – novaj kaj spertaj homoj reprezentis TEJO-n ĉe diversaj organizoj kaj institucioj kvalite kaj altnivele.

2015

La agado kadre de Forumo Junulara Eŭropa (FoJE) restas tre grava: la membrokonsilion en Madrido partoprenis mi, Léon Schnelldorfer kaj Oleksandra Kovyazina (Sasha Murr) - tie TEJO interalie sukcesis forigi lingvan diskriminacion por programo por helpi persekutitajn studentojn.

Ekster la statutaj eventoj Léon partoprenis en septembro Eŭrop-Araban Junularan Forumon en Strasburgo, Sasha partoprenis kunsidon de la

klimatŝanĝa reto de FoJE kaj Stephanie Cabovianco estis en la delegitaro de FoJE ĉe COP21, klimatsanĝa UN-konferenco okazinta en Parizo.

Pri la labororganoj de FoJE, Enric Baltasar estis akceptita membro de la spertulgrupo pri sociaj movadoj kiu laboras por krei studon pri la temo.

Aktivan postenon mi plenumis kiel membro de la Konsultorgano pri Membreco kadre de kiu mi studvizitis la Nacian Junularan Konsilion de Makedonujo en Skopjo kaj la Junajn Demokratojn por Eŭropo en Parizo.

Estis pluraj aliaj KER-umadoj en Eŭropo, ankaŭ ekster la kadro de FoJE:

- Francesco Maurelli partoprenis seminarion pri junulara kunlaborado EU-Ĉinujo en Bruselo.

- Sasha Murr partoprenis eventon de la Eŭropa platformo pri junulara lernomoviĝeblo en Istanbulo en oktobro kadre de partenerado inter EU kaj Konsilio de Eŭropo.

- Michael Boris Mandirola, Tabea Maltry kaj Poór Veronika reprezentis TEJO-n en la tria Junulara Forumo de la Eŭropa Centro pri Paco kaj Evoluigo en Beogrado, kie mi intervenis pri "La rolo de Esperanto kiel lingvo de paco" kaj Veronika pri "Enpovigo de junularo por kultivi pacon". Bedaŭrinde ne estis akceptita nia kandidatiĝo por partopreni la jaran konferencon de UNITED.

Je tutmonda nivelo menciindas la agado de TEJO en IKRJO, la organizaro kiu kunigas la ĉefajn tutmondajn organizojn tra la mondo.

La jaran kunsidon partoprenis Michael Brandini, Fernando Maia Jr kaj Namir Rodríguez kaj tiam TEJO estis reelektita en la kerna laborgrupo de IKRJO kiu havas la taskon gvidi la organizaron.

Danke al nia agado en IKRJO, estiĝis la ebleco sendi plurajn TEJO-aktivulojn reprezenti nian organizon: Mlossi Saidi reprezentis IKRJO-n en la Monda Forumo pri Junularo, Paco kaj Sekureco okazinta en Amano kaj Ana Ribeiro estis oficiale invitita de UNDP - Evoluiga Programo de UN - partopreni kaj prelegi en la 3-a Monda Forumo pri Loka Ekonomika Evoluo okazinta en Torino.

Costanza Schönfeld (Tuŝka) partoprenis la unuan laboran preparkunvenon kun aliaj internaciaj junularaj organizoj por la okazigo de la Europa Junulara Okazaĵo en Strasburgo, dum majo 2016.

Daŭras ankaŭ la kutima agado de TEJO ĉe Unesko, en oktobro 2015 Saŝa Murr kaj Klara Ertl partoprenis la Junularan Forumon de Unesko. Lige al tiu Klara partoprenis pli fruan Preparan Kunsidon de Eŭropaj junularaj delegitoj en Bruselo zorge de la Flanda Junulara Konsilio.

2016

Kadre de Forumo Junulara Eŭropa la agado daŭras kaj intensas, aprile la membrokonsilion en Madrido partoprenis mi kaj Sasha Murr.

En januaro, je la komenco de la mandato, Sasha Murr transprenis de Poór Veronika (kiu rezignis pro gravaj personaj kaj profesiaj sindevigoj) la lokon en la Konsila Konsilio pri Junularo de Konsilio de Eŭropo kie TEJO estis elektita pasintjare kiel parto de la reprezentantoj de Forumo Junulara Eŭropa.

Costanza Schönfeld (Tuŝka) ĉefrespondecis flanke de TEJO pri EJO (EYE), Eŭropa Junulara Okazaĵo en Strasburgo de la 19-a ĝis la 21-a de majo kie kunvenis pli ol 7000 eŭropaj gejunuloj - ĝin organizis Forumo Junulara Eŭropa kaj TEJO estis oficiala partnero. Nia organizo partoprenis per 33 membroj (plus aliaj 8 novaj junaj esperantistoj el Trento de la grupo de Walter Bruno) kaj okazigis bazan kurson de Esperanto kaj lingvopolitikan ludon.

Post EJO okazis strategia kunsido de TEJO-KER gvidita de Veronika, Ĝenerala Direktoro kaj sperta KER-aktivulo. Estis ellaboritaj specifaj strategioj pri FoJE, IKRJO, Unesko kaj UNITED en laborgrupoj.

Alikunteskte Tuŝka partoprenis jaran konferencon de UNITED apud Torino kun ĉeftemo Rifuĝintoj.

Tutmonde la agado en IKRJO restas engaĝa por TEJO; ni transprenis la taskon je kontaktado de la aliaj membraj organizoj kaj en junio Michael Boris kaj Francesco partoprenis en Bruselo kunsidon de la kerna laborgrupo de IKRJO kie ni antaŭvidas kreskantan kerniĝantan rolon por TEJO.

Danke al nia agado en IKRJO, ni donis la ŝancon al Lucas Barbosa (Brazilo) partopreni la projekton “Junulara ŝanco - Manĝaĵo por la estonteco”.

TEJO-KER estas tre aktiva komisiono kun pluraj spertaj homoj kiu garantias kontinuecon kaj kompetenton kune kun diversaj gejunuloj kiuj iom post iom fariĝas pli aktivaj kaj prenas kernan rolon en la komisiono.

La agado estas vigla kaj je tutmonda kaj je eŭropa nivelo; malpli fortas la agado je kontinenta nivelo ekster Eŭropo, malgraŭ ia strebo en Ameriko, sed dirindas ke la socipolitikaj kondiĉoj estas multe pli favoraj en Eŭropo ol en aliaj kontinentoj.

La reputacio de TEJO signife pliboniĝis laŭ la jaroj kaj ni estas ĉiam pli aktiva kaj konata organizo. Tio postulas multe da homaj kaj financaj rimedoj por ke TEJO povu almenaŭ gardi ĉi tiun nivelon da aktiveco - aliflanke tiu mono iasence revenas, ja nia laboro en Forumo Junulara Eŭropa kaj IKRJO estis menciitaj kiel argumentoj por aljuĝo de la administra subvencio en 2016.

Homaj rimedoj

raportas Juliana Evandro, respondeca estrarano

Mi ricevis la komisionon de la antaŭa estrarano Veronika Poór. En 2013, dum la IJK en Israelo, mi havis la ideon sendi al novaj membroj de TEJO serion da klarigaj mesaĝoj pri la Esperanto-movado kaj la komununo. La projekto nomiĝas TEJO-Enkondukas. Mi eklaboras por transigi ĝin al la servo MailChimp, tiel ke ĉiuj, kiuj unuafoje membriĝas en TEJO ekricevu ĝin.

Estrarnivele, ni decidis plenumi la decidon de la komitato kaj daŭrigis la disdonadon de kondomoj dum E-aranĝoj. Por ŝpari monon de TEJO, mi kunportis al Eŭropo 432 kondomojn kaj 200 lubrikaĵojn (ili estas senpagaj en Brazilo kaj validas dum 5 jaroj). Kelkaj el ili estis disdonitaj dum la IJF en Pesaro.

Krom tio, mi sendis al novaj aktivuloj de TEJO gvidliniojn por helpi en siaj novaj postenoj, sendis demandaron al UEA-membroj kiuj estos atingitaj de

la ŝanĝo de TEJO-aĝlimo. Oni ankaŭ produktis novajn vizitkartojn por TEJO-representantoj dum EJO en Strasburgo.

Informado

Informiloj

raportas Juliana Evandro, respondeca estrarano

Danke al la laboro de pluraj aktivuloj, kiuj tradukis kaj reviziis la informilojn de TEJO, ni sukcesis ekhavi ĝin en 7 novaj lingvoj (arpitana, dana, ĉeĥa, kataluna, hispana-eŭropo, hispana-ameriko, vjetnama kaj piemonta). Kelkaj jam estas enpaĝigitaj, sed mankas reviziisto por ili. Specialan dankon al Marta Wierzbowska, kiu enpaĝigis la informilojn kaj al Costanza Schönfeld, kiuj kunlaboris pri kunordigo de la tradukadoj. Ĉiuj informiloj de haveblas ĉi tie:

<http://tejo.org/agadoj/informado-informiloj/#unustila>

Nova servilo

raportas Michal Matúšov (KuboF), volontulo

Iuj retaj servoj de TEJO dum longa tempo suferadis paneadon kaj malfacilan prilaboradon. Tio ripete kaŭzadis unuflanke nefunkciadon de la retejoj de TEJO kaj de retpoŝta plusendado kaj duaflanke malplifaciligadis pluevoluadon de retaj servoj. Pro tio TEJO decidis transiri al alia retservo-provizanto. Komence de la jaro 2016 la volontulo KuboF prizorgis transiron de ĉiuj TEJO-domajnoj al nova registranto. Sekve li komencis laboradon pri migrado de ĉiuj TEJO-retejoj al nova servilo, luita jam antaŭe. Tiu ĉi grava laboro pro manko de dokumentado kaj aliaj gravaj kaj urĝaj taskoj progresadis malrapide. Fine de junio 2016 la afero revigliĝis danke al aliaj helpantoj kun espero forlasi la malnovan servilon ĝis fino de 2016.

Post transiro al la nova servilo, TEJO etendos siajn retajn servojn. Al unuaj apartenas eblo facile kreadi subretejojn ĉe la domajno tejo.org, kion jam petis kelkaj komisionoj kaj eblos ĝin uzadi por IJK-retejoj kaj eventuale por landaj kaj fakaj asocioj de TEJO.

TEJO-aktuale

raportas Juliana Evandro, respondeca estrarano

Sub la redaktorado de Jan Kozousek, reta informilo de TEJO aperas 2 semajne-ritme. Ekde majo 2016 ĝi estas abonebla pere de nova servo, MailChimp (kaj tio okazis danke al la ĉeesto de Joop Kieft en la Centra Oficejo por helpi en la sekura transigo de la abonadresaro al la nova servo). Inter aŭgusto 2015 kaj junio 2016, estis eldonitaj 15 numeroj: <http://tejo.org/dokumentoj-kategorio/tejo-aktuale/>. Ĝi nuntempe havas 885 abonantojn.

Kongresoj

raportas Arina Osipova, respondeca estrarano

IJK 2016 en Pollando

La 72-a IJK okazos de la 16-a ĝis la 23-a de julio en Vroclavo (Pollando). La temo de ĉi-jara kongreso #AKTIVADO estas dediĉita al reta aktivado de neregistaraj organizoj. Pli da informo pri la kongreso: <http://ijk2016.tejo.org/eo>

La unuan fojon mi kunorganizas IJK-n kiel estrarano. Por mi tio estas sendube tre respondeca kaj malfacila tasko, dum kies realigado okazis kelkaj malperfektaĵoj pri la organizado. La teamo, kiu antaŭe kandidatiĝis por okazigi IJK-n en Vroclavo pro diversaj kialoj signife malgrandiĝis. Por multaj gravaj roloj mankis organizantoj. Tamen indas rimarki, ke tiuj PEJanoj, kiuj ĝis nun strebas fari la kongreson sukcesa, faras grandan laboron kaj plenumas samtempe multajn taskojn.

Du junaj aktivuloj el Ĉinio kaj Peruo ricevis subvencion de TEJO, kiu kovros partoprenkotizon kaj parte ankaŭ vojaĝkostojn al la IJK. Rekompence la subtenitoj helpos en la plenumado de organizaj taskoj dum la kongreso.

Kadre de la IJK okazos dua parto de ETEY-trejnado (la unua okazis dum IJF 2016 en Italio).

Indas ankaŭ rimarki, ke al la IJK aliĝis granda grupo de italaj adoleskuloj (ĉ. 20 homoj), por kiuj la organizantoj proponas apartajn programerojn,

kiuj povos enmovadigi la adoleskulojn. Espereble tio ankaŭ helpos aktivigi komisionon pri adoleska agado.

IJK 2017 en Afriko

La Estraro ricevis kelkajn kandidatiĝojn por IJK en Afriko. Dum Estrara Kunsido marte 2016 en Italio estis elektita plej taŭga kandidato por IJK 2017 - Burundo. La burundanoj plej respondece kaj serioze plenigis la formularon kaj certigis la Estraron pri sia preto kunlabori kaj organizi la Kongreson.

Kadre de la programo Erasmus+ estis pretigita subvencipeto por strategia partnerado en la kampo de junularo kun eŭropaj kaj afrikaj organizoj sub kunordigo de TEJO. Ĝi estis konceptita ankoraŭ de la antaŭa Estraro kaj estis verkata por limdato en aprilo 2015, sed tiam ne sufiĉis tempo por ke ĝi estu finprilaborita en prezentinda nivelo. La unua sendoprovo okazis en septembro 2015 kaj tiam la projekto estis malaprobata. Post la dua provo okazinta en februaro fine de majo 2016 la subvencipeto por Kapablokonstruado Inter Eŭropaj kaj Afrikaj landoj estis aprobita. Tio ebligas alporti al IJK 2017 kelkdekojn de gejunuloj el la partneraj landoj kaj vojaĝigi kelkajn aktivulojn por trejniĝi dum eventoj en Eŭropo kaj Afriko.

Aliflanke la nuna politika situacio en Burundo ne estas tute stabila, ĉar intertempe okazis prezidentaj elektoj, kio kreas enajn konfliktojn kaj malpermesas paroli pri plena sekureco en la lando. En iuj landoj ministerioj pri eksterlandaj aferoj malrekomendas memstarajn vizitojn en Burundo. La eŭropa agentejo respondeca pri nia subvencipeto konfirmis, ke en kazo de problemoj eblas alilokigi la burundan parton de la projekto, do konsekvence ankaŭ la IJK-n. Pro ĉio ĉi la Estraro decidis peti opinion de la Komitato kaj voĉdoni pri okazigo de IJK en Burundo. Bedaŭrinde ne estis atingita la kvorumo dum la voĉdonado kaj la decido revenis al la Estraro kiu esploras okazigon de la IJK en alia afrika lando.

Landa agado

raportas Ariadna García Gutiérrez, respondeca estrarano

Unu el la koncernaj fokusendaj agadkampoj (surbaze de la Strategia Laborplano de TEJO 2014-2017) rilate al la Landa kaj Regiona Agado estis parto de la agadkampo 3: Komunumo. Unu el la taskoj de tiu agadkampo cele al tutmonda agado pli vigla, estis la kreo de monregionaj komisionoj/oficejoj.

Okazis unu kunsido pri Landa Agado kun la komisiitoj pri Landa Agado en Ameriko, Eŭropo kaj Azio, la 12-an de decembro 2015. Inter la temoj traktitaj estis la jenaj:

- stato de la agado en niaj kontinentoj;
- la graveco ĉiam atenti la ĝeneralajn taskojn priskribitajn en la Strategia Laborplano de TEJO 2014-2017;
- la ideoj, projektoj kaj proponoj kiuj ni mem povas sugesti por la daŭra evoluo de nia movado kaj envolvigo de la internacia junularo.

Unu el la interkonsentoj de tiu kunsido estis esplori pri la ekzisto de esperantaj junularaj grupoj en la diversaj kontinentoj kaj provi kontakti ilin, temis pri la unua paŝo survoje al la kreo de mondregionaj komisionoj/oficejoj.

Rilate al la atendataj rezultoj de tiu ĉi agado, laŭdire:

- almenaŭ du novaj LS-j jare naskitaj post perado de la regiona komisiono: Estis preteco kun la junularo en Peruo sed nur ekzistis dekomence kontaktado kun 1 esperantisto, poste silento rilate al la temo;
- nevakeco de regionaj komisiitoj: Je la mezo de la jaro mi devis prepari alvokon por nova komisiito pri LA en Azio kaj post tio la nova ĵus elektita komisiito pri LA en Azio malaperis;
- agado de homoj el almenaŭ 3 landoj en ĉiu el almenaŭ 4 regionaj komisionoj estis.

Alia agado rilate al la landa kaj regiona agado temis pri la havigo de mastrumadsistemo pri siaj membroj al la LS-j.

Por havigi mastrumadsistemon pri siaj membroj al la LS-j unue bezonatas tempo kaj spertulo kaj dum duono da jaro ne eblas tion fari, krome endas

unue havi la bezonatajn informojn, kiel estis listigitaj en la agadoj rilate al tio:

- kolekti sistemojn uzataj de landaj sekcioj (ĝis aprilo 2015);
- kolekti sistemojn uzatajn de almenaŭ 10 aliaj junularaj neregistaraj organizoj (ĝis aprilo 2015);
- kolekti informojn pri aliaj eblaj ekzistantaj mastrumadsistemoj de membroj por ne registaraj organizoj (ĝis aprilo 2015).

Pri tiuj ĉiuj agadoj estis nenia informo transdonata, ne eblis entute labori pri la temo, almenaŭ ne ĝis nun.

- kompari solvojn kaj surbaze de tio krei demandaron al LS-j pri kian sistemon ili bezonas (ĝis junio 2015). Pri tio ĉi mi faris similan rekomendon en la raporto pri KODEJO 2015 pro tio ke aperas nur demando rilate al tio ĉu la sekcioj uzas mastrumadsistemon aŭ ne sed ne baza priskribo pri iliaj bezonoj rilate al mastrumadsistemo de siaj membroj.

Krome estis lanĉita la Kompleta Demandaro pri Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO) 2016, en kiu partoprenis 26 Landaj Sekcioj kaj 3 Fakaj Sekcioj de TEJO, kio evidentigas malforton en la komunikado inter TEJO kaj siaj Landaj Sekcioj, unu el la defioj kiuj daŭre devas alfronti internacian organizon. Vi ricevas krome la tutan raporton pri KODEJO 2015.

Kvankam daŭre estas malforta la agado en Australio, mi povas informi ke almenaŭ kontaktado sufiĉe bone efikis, trifoje mi interŝanĝis kun tiea esperantistino kiu pretas helpi plu kontakti kun aliaj esperantistaj gejunuloj, ankoraŭ ni ne havas konkretan planon kaj/aŭ rezulton rilate al esperanta junulara grupo tie, tamen ni survojas kaj tio laŭ mi ja estas antaŭpozitiveco.

Survojaj Projektoj

Nuntempe ni demarŝas kelkajn projektojn, inter ili, interkontinentaj projektoj Eŭropo-Ameriko, Eŭropo-Azio, Eŭropo-Afriko.

Rezultoj

Rilate al junulara agado estis pozitiva rezulto, ĉi jare TEJO sukcesis helpi finance la aziajn gejunulojn por partopreni la Komunan Seminarion,

aranĝon kiu ili organizas ĉiujare por ebligi la partoprenon de aziaj gejunuloj por sperti la esperantan agadon. Raporto pri tio estos sendita.

Konkludoj

Estas frue ankoraŭ por antaŭvidi konkretajn rezultojn rilate ĉefe al Landa Agado, unu el la plej malfacilaj agadkampoj de nia komunumo, ĉar dependas ne de homo sed de homoj kaj komunikado ĉiam peras la agadon. Ni daŭre sekvas la vojon kaj strebos al pli forta komunikado inter niaj Landaj kaj Fakaj Sekcioj kaj al plia kunlaboro interkontinenta, regiona kaj teama.

Landa Agado en Ameriko

raportas Sarah Monteiro, komisiito

Mi sukcesis kontakti kun Meksiko kie regule okazas renkontiĝojn en la ĉefurbo laŭ mesaĝo de David López. Mi provis trovi knabojn el Gvatemalo kaj Haitio, sed ne sukcesis trovi ilin per Facebook. Nome de TEJO mi volas helpi al Fernando Maia, el Brazilo kiu havas sugeston pri projekto por LA en SudAmeriko, temas pri organizado de renkontiĝoj dum januaro en urbo kiu troviĝas en la landlimo inter Brazilo kaj aliaj landoj, por komenci, Brazila Esperanto Ligo elektis Foz do Iguaçu, kiu havas landlimon kun Argentino kaj Paragvajo. Mi volas propagandi tiun ideon kaj la unua evento en TutAmerika Kongreso de Esperanto en Kolombio ĉijare (TAKE), ankaŭ fari diskutrondon tie pri niaj problemoj, pere de dinamikaj ludoj antaŭ diskutadoj, por fortigi la grupon kiel homoj faras en AMO-Seminario; demandi kaj kolekti ideojn pri kiel solvi ilin kaj krome ankaŭ prelegi pri TEJO.

Por la fino de la jaro, mi helpos organizi Novjaran Aranĝon (NOVA) en Foz do Iguaçu por ke ni invitu gejunulojn el tri landoj. Konsiderante ke ni ne sukcesos agi tra tuta Ameriko tiom efike kaj rapide kiel ni bezonas, tio estas granda komenco.

Landa Agado en Eŭropo

raportas Enric Baltasar, komisiito

Mi prezentas skizon pri mia agado:

- De la komenciĝo mi rimarkis egan mankon de orientiĝo de TEJO al Landa Agado, ĉefe en la praktiko: la laborplano apenaŭ tuŝas ĉi kampon, la aferoj kiujn petas la landaj sekcioj oni ne faras, mankas iloj por la sekcioj, ne estas tasklistoj por la komisiitoj, ktp. Endas reformo al ĉi situacio, kaj per volontula kaj per pagata helpo, ĉefe de merkatikistoj kaj programistoj.
- Oni multe petas al mi disvastigi informojn kaj sekvi la laborplanon, sed mi pli ŝatas strategiajn taskojn ol urĝaj, kaj mi insistas dirante ke neniel estas sufiĉe da rimedoj por tio kion oni petas. Krome, oni plendas pri la ĉiama urĝigo de TEJO (ĉu ne eblas almenaŭ havi kalendaron por antaŭvidi la plimulton da aferoj?)
- Kaj komisiitoj kaj komitatanoj ĝenerale apenaŭ aktivas, kaj en mia agadkampo mi vidis tiom malmulte da kunlaborado ke plurajn fojojn mi pensis ĉu ne pli bonus agadi sola aŭ eĉ peti helpon. Estas ŝoke vidi ke homoj havas postenojn por kiuj ili nek kapablas nek havas ideojn, aŭ nenion faras.
- Mi provis iniciati plurajn gravajn projektojn, kiel la mentora programo kaj retejkreilo, sed mi bezonos pli da tempo por ili ĉar ekzemple por la unua neni helpis ĝis nun. Kaj mi ne komprenas tion.
- Mi vidis min devigata fokusiĝi preskaŭ nur pri aferoj kiujn mi povas fari sola (kun diskutado kaj opini-petado tamen, mi tre ŝatas fari tion).
- Mi rolis kiel trejnisto (Germanio kaj Hungario, krome venos Pollando kaj Slovakio) kaj montris grandan intereson tiuflanke. Bedaŭrinde, nia komisiito pri Aktivula Trejnado estas fantomo. Mi kredas ke ni ĉefe bezonas retmaterialojn, kaj tial daŭrigas mian laboron publikigante aktivul-artikolojn. Aliflanke mi provas spertiĝi kaj partoprenas ETEY, interalie.
- Mi atingis ke mia blogo pri instruado de Esperanto estu la plej aktiva en la hispana lingvo, kaj ĝi jam ricevas pli ol 3.000 malsamajn vizitantojn ĉiumonate. Ĉi-flanke mi multe laboras, ekzemple tradukinte la modernigitan zagreban metodon en la hispanan kaj novan Duolingo-kurson, kiun jam petis preskaŭ 12.000 homoj.
- Reuzado estas io kion mi taksas prioritata: krei materialojn kiujn oni povas traduki, eble adapti, kaj uzi en ajna lingvo, kiel prelegoj, atelieroj,

flugfolioj, ktp. Tial mi komencis projektojn aŭ kunlaboris kun tio kaj ankaŭ kreis deponejojn de materialoj.

- Multe mi partoprenis movadajn diskutojn por vidi kion oni bezonas: aktivuloj, lernantoj, interesiĝantoj pri la lingvo, ktp. Kaj lastatempe mi kreis privatan diskutejon kun nur selektitaj homoj.

- Nia movado bezonas malfermecon al la mondo, kaj mi estas en persona aŭ eventa kontakto kun aktivuloj el aliaj movadoj. Ekzemple, mi partoprenas grupon de spertuloj pri sociaj movadoj de Eŭropa Junulara Forumo.

- Ni bezonas du novajn komisionojn: merkatika kaj teknologia. Mi starigis la unuan, kaj provas aktivigi ĝin kaj aktivi en ĝi. Ekzemplo estas ke mi realigis la (unuan!?) socian reserĉon pri Esperanto al neesperantistoj.

- Erasmus+: Michael Boris Mandirola kaj mi verkis prian dokumenton, mi iom post iom sentiĝas pli komforta pri tiu kadro, kaj mi pensas kiel uzi tiun eblon pli bone. Antaŭ du monatoj mi kontaktis nejunularjan landajn sekciojn por ke ili sendu junuloj, kaj pluraj interesiĝis. Kaj, evidente, varbi, varbi, varbi.

- Ĉar la strategia planado ne bone reprezentas Landan Agadon kaj ne estas analizo pri ĝi, mi komencis projekton nomata MAP.

- Datumoj estas tre gravaj, kaj mi kreis ekzemple pri landaj referencpunktoj kaj organizoj.

- Disponigis spacon en Trello por la agado de ajna aktivulo.

- Verkis artikolon por TEJO Tutmonde pri LA.

- Okazigis la kampanjon #IdeoPorEsperanto, kiu daŭre funkcias.

Merkatiko

raportas Héctor Tomás Díaz Rivera, komisiito

Allogi, Interagi, Koverti kaj Fideligi. Tiuj eroj konsistigas la kvarpartan vend-fundelon sur kiu nia Komisiono baziĝas por varbi pri Esperanto kaj

TEJO. Nia Komisiono estis fondita por kune labori kun ĉiuj komisionoj de la organizo, certigante ke ĉiuj agoj kongruu pri la vend-funelo kaj efika publika komunikado, kreante la plej bonan sperton al la fina uzanto en ĉiu parto de la procezo.

Ni iom post iom aktiviĝas kaj organiziĝas, estanta nia plej ofta agado konsili pri nia fako kiam oni petas al ni doni konsilojn, kion ĉefe petis TEJO, sed ne nur.

Ni kreis Instagram-konton de TEJO:

<https://www.instagram.com/tejoesperanto/>

Laŭ nia kompreno de celgrupo necesas aperi en Instagram, kaj ni bezonas bildigi nian komunumon. Post kvar fotoj ni jam atingis preskaŭ 100 sekvantojn, kaj ni daŭrigos ĉi-flanke.

Ankaŭ pri sociaj retoj, ni kreis etan ŝablonon por publikigoj kaj proponis nomkoherigon en sociaj retoj, sed iom ŝajnas esti neniu ĉefrespondeculo kaj ĉiuj prenas sian propran decidon, do foje ni devas limiĝi al proponado.

Alia afero, pri kiu fokusiĝos la Komisiono, estas la projekto pri retejigo, por la kreo de pakaĵo por ekuzado de retpaĝaroj, plej videbla kiel fasona ŝablono por landaj sekcioj. Enric Baltasar, Álex Escomu kaj Héctor Díaz realigas la laboron. Ĝi celas ke 1) organizoj (sed ne nur) havu retejon, 2) ili postulu malmulte da ĝisdatigo, 3) ili estu belaj, 4) facile troveblaj per Interreto kaj 5) vere varbu homojn (ne, ne nur per teksto, sed per diskonigoj per Facebook, kaptado de retpoŝtadreso...)

Komentindas la eldonado de videoj pri IJK por neesperantistoj. La gajninto de la konkurso Partoprenu IJK-n nuntempe laboras pri tio, kaj ni esperas ke tiu video estos utila materialo por reklami kaj klarigi pri tio temas kaj kio okazas dum kongresoj al neparolantoj kaj interesiĝantoj.

Moviĝeblo

raportas Alexandre Raymond (Alekcjo), komisiito

La Komisiono pri Moviĝeblo fondiĝis laŭ simpla konstato: en la interretaj tempoj, esperanto disvolviĝis al vasta parolantaro, tamen, multaj el ili ne

aperas en kongresoj. Unu el la ĉefa kialo estas la ĝenerale alta elspezo por la alvojaĝado. Bezono organizi karavanojn ekaperis iel memstare dum kelkaj jaroj, el diversaj sendependaj projektoj, kaj kun la tempo, ni konstatis ke ni devas oficialigi tiun laboradon, ĉar ĝi estas tre sukcesa je diversaj aspektoj:

1. Por la kongresanto mem, kiu bezonas malpli elspezi por kongresumi.
2. Por la kongreso mem, kiu povas malfermiĝi al pli larĝa kvanto de partoprenantoj.
3. Por la asocioj, kiuj povas subvencii vojaĝadon de pli da homoj.

La graveco de karavano ne ĉiam estas bone taksita de kongresorganizantoj, kiuj ofte vidas duarangan prizorgadon en ĝi. Tamen, la nuna projekto de la moviĝebla komisiono estas plene integriĝi en la kongresorganizado, tio signifas, aperi en la retpaĝo, en la aliĝilo, en la informiloj, ĉar bone organizata karavano povas dreni altegan kvanton de partoprenantoj al kongreso. Ĝis nun, ni sufiĉe amare laboradis, kaj nia nuna projekto celas multe pli efike vojaĝigi la homojn.

Ekzemple, ni nun havas preparoladon kun organizantoj de JES rilate al tio, kaj ni planas elserĉi jam interesatajn renkontiĝojn por sekva somero.

La Komisiono povas facile movigi grandan kvanton de homoj, ĉar ni laboras ĉefe per grupaj biletoj, kiuj permesas al ni atingi malaltegan prezon kiujn ni ne sukcesus por vojaĝigi unuopan homon. Pro tio, ni konsideras ke ni devas plibonigi la interlaboradon kun TEJO, sed ankaŭ kun aliaj teritoriaj kaj fakaj asocioj, por vojaĝigi la aktivulojn: la nura provo de tiu amasa movigado por eŭropa renkontiĝo en Strasburgo ne estis tiom sukcesa pro 3 ĉefaj kialoj: unue, manko de komunikado, due, troa diseco de la alvenintoj, trie, ne sufiĉaj planado kaj elserĉo.

Pasporta Servo

raportas Lars Sözüer, komisiito

2015

La komenco de la jaro 2015 havis kaj bonan kaj malbonan novaĵon por Pasporta Servo.

Post la kompleta putriĝo kaj paneo de la retejo, la komisiito Roy McCoy gvidis teamon kiu sukcesis savi la datumojn, purigi ilin de spamo, kaj aperigi unuan funkciantan version de nova retejo. Tiun programis Baptiste Darthenay. Ĉi tiom la bona novaĵo.

Malbone estis ke frue en 2015 Roy demisiis, kaj Baptiste haltigis la laborojn ĉar mankis klara interkonsento pri lia honorario. Dum IJK la nova TEJO-estraro nomumis kiel novan komisiiton Lars Sözüer. Tiu peradis negocadon inter la estraro kaj Baptiste, kaj rezultis interkonsento por ambaŭ kontentigaj. Tiu antaŭvidas ke Baptiste plenumu klare difinitajn kaj kontroleblajn laborojn, antaŭ ol li rajtas ricevi la modestan honorarion de 1000 EUR. Ankoraŭ en 2015 li rekomencis labori pri la retejo.

2016

Dum la jaro 2016 aliĝis al la programista teamo ankoraŭ Meiyer Goren kaj Ana Ribeiro. Sub gvido de Baptiste Darthenay, la teamo aldonis pliajn funkciojn al la retejo, plibonigis ĝin kaj riparis cimojn. La teamo ankaŭ zorgis, ke ĉiuj novaj mesaĝoj sendataj al unu el la kelkaj retpoŝtadreso de Pasporta Servo estu traktataj kaj respondataj. Pretiĝis krome paĝo kun zomebla mapo por serĉi gastigantojn, sed tiu ĝis nun ankoraŭ ne fariĝis publika, ĉar necesas unue zorgi, ke ĝi prezentu nur tiujn datumojn, kiuj estu alirebla laŭ la ensaluta stato de uzanto.

Cetere la estraro kaj la komisiito ellaboris komune detalan planon pri la eldonado de la adreslibro, kiu laŭ tiu plano aperu en decembro 2016. La plano inkluzivas ankaŭ financan strategion: la gastigantoj ne plu ricevos ĉiuj aŭtomate senpage la adreslibron, ĉar pro la ekzisto de la retejo ne ĉiuj nepre bezonas ĝin; ne-gastigantoj povos aĉeti la libron je ĝia normala prezo; gastigantoj ĝenerale aĉetu la libron je tre favoraj kondiĉoj (egale proksimume al niaj preskostoj+sendokostoj); nur laŭ peto ili povu mendi ĝin kontraŭ nur sendokostoj; kaj tute escepte ni sendos la libron laŭ peto senpage al tiuj gastigantoj, kiuj nepre bezonas la libron sed tute ne povas pagi. La detalajn prezojn de tiu strategio necesas ankoraŭ elkalkuli.

Scienca kaj faka agado

raportas Ariadna García Gutiérrez, respondeca estrarano

Mi interŝanĝis retmesaĝojn kun la antaŭaj komisito Nelly Durbois, kiu informis min pri la ĝisnuna agado de la komisiono. Kune kun Vit Guglielmo, el Ĉeĥio, la tiama komisiito organizis prelegsesion dum JES 2015 kaj post tio mi interŝanĝis kun Anthony Lucas, membro de Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE) por kunlaboro inter tiu scienca asocio kaj TEJO, pro la graveco de la scienca agadkampo en nia movado kaj ĉi kaze, pli precize, instige al junularo.

Mi ricevis retmesaĝon de junulo Jonas Sauer kiu jam de antaŭ unu jaro interesiĝas pri publikigo de sciencaj artikoloj pri matematiko kiujn li verkis. Li celas traduki ilin al Esperanto, nun kiam jam la originaloj pretas. Aldona ĝojiga novaĵo rilate al la temo, estis la malfermo de science rubriko en la revuo Kontakto.

Dum la ĉi jara IJK okazonta en Vroclavo, Pollando, okazos prelegsesio organizita de Tomasz Szymula.

Mi ricevis intereson de “Verdaj Skoltoj” por iĝi Faka Sekcio de TEJO, pri kio ni daŭre interŝanĝas.

Krome, mi ĝojas anonci ke ni havas ankaŭ novan komisiiton pri Scienca kaj Faka Agado, nome, Ana Ribeiro el Brazilo.

Oficisto

raportas Mounir Abjiou, oficisto

Mi komencis mian laboron kun TEJO je la komenco de novembro 2015 kiel TEJO-oficisto. Dum la unuaj semajnoj, mi ricevis amason da taskoj kiujn mi malkovris iom post iom kaj grade lernis. Mi nun sentas min pli sperta kaj konscia pri oficistaj taskoj ol dum la unuaj semajnoj de mia laboro kaj mi povas diri ke mi komprenas vaste kaj pli bone la oficistan postenon, sendepende.

La unua grava tasko kiun mi havis estis verki la administran subvencion por la jaro 2016 kiun ni ricevis post kelkaj monatoj, tiam mi devis esplori pri la praktika funkciado de diversaj iloj kiujn TEJO uzas kun la Nacia Agentejo kaj EACEA. Bedaŭrinde, ni ne povis uzi la subvencion de Seed Funding kaj post multaj klopodoj, niaj du afrikanoj ne ricevis vizon, tial la

subvencia sumo revenis al la subvencionantoj ĉar laŭregule ne eblis uzi ĝin aliel. Poste, alia grava tasko kiun mi devis ekprizorgi dum 2015 estas EVS, Paŭlo jam estis sperta pri lia volontulado pro lia proksima sperto kun TEJO, tamen mi daŭre devis kompreni kion TEJO devas fari rilate al lia foriro kaj rilate al la alveno de Jérémie kaj KuboF, Dorota, kiun mi dankas, montris al mi kiel ĝuste funkcias Mobility Tool kaj EVS ĝenerale. Mi zorgis pri la finigo de la volontulado de Paŭlo kaj lia fina raporto. Dume, mi devis trovi novan sendan organizon al Jérémie kun lia helpo kaj trakti administraĵojn kun ĝi kaj la Nacia Agentejo, ĉar lia originala senda organizo ne plu emis sendi lin. Samtempe, mi verkis subvencipeton por ricevi plian volontulon tra EVS por la februara limdato kaj poste por la aprila limdato.

Post la ricevo de la administra subvencio, ni devis sendi novan version de la financa identigilo al niaj subvencionantoj de EACEA. Subvencirilate, serĉante novajn subvencifontojn mi malkovris la NED-fonduson, National Endowment for Democracy, kiun mi planas trakti pli poste kun aliaj limdatoj kune kun la Eŭropa Junulara Fonduso. Miaj nunaj prizorgoj antaŭ la somero de la jaro 2016 estas trakti la projekton ETEY en Mobility Tool kaj pretigi dokumentojn petataj per EACEA aldone al la fina raporto de la jaro 2015. Dume, ni atendas respondon pri subvencipeto por plia volontulo kaj rezulto pri la subvencio de DEAR Call al EuropAid kiun WOSM pretigis kun TEJO, UEA kaj aliaj organizoj. Post proksimume ok monatoj de laboro kun TEJO, mi sendube sentas min sendependa nun kaj pli atenta pri ĉiuj detaloj de la oficista posteno.

Raportas Uriel Gurdían, oficisto

Komence de januaro 2016 mi eklaboris kun TEJO kiel oficisto. Tuj mi ricevis taskojn kaj samtempe helpon de la stabo de TEJO. Dum la laboro mi pli kaj pli al kutimiĝis al la posteno kaj al la labormaniero de la organizo.

Miaj unuaj taskoj estis kompari informojn pri TEJO ĉe la retejo de UEA kaj ĝisdatigi informojn pri komitatanoj kaj komisionoj. Mi ricevis la taskon labori kun la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, kie la laboro estas tre diversa. Mi kontribuis al demandaro pri Agendo de kapabloj de Eŭropa Unio, mi helpis ĉe redaktado de tri-monata raporto de la labor-forto de IKRJO (Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj) kie

TEJO membras, kaj regule mi verkas resumon de ĉiumerkreda novaĵaro de FoJE (Forumo Junulara Eŭropa).

Krom tio, mi ankaŭ helpas la estraron diversmaniere, mi enmetas ĉiun monatan cirkuleron en la retpaĝo de TEJO, aktualigas informojn pri komisiitoj kaj tradukas malfermajn alvokojn kiam necesas.

Post la sukcesa subvencio de Eŭropa-Afrika projekto mi preparis mandatilojn kaj kunordigis kun ĉiuj partneraj organizoj la sukcesa plenumo kaj subskribado de ili, por Kongolando mi ankaŭ devis prepari dokumentojn pri ŝanĝo de laŭleĝaj reprezentantoj kaj same zorgi pri la ĝusta plenumo kaj subskribado.

En marto mi komencis prepari trejnad-skatolon kadre de la projekto ETEY (Trenado de trejnistoj) kaj kontaktis trejnistojn por kolekti materialojn kaj ordigi ilin, post la sesio de IJK ĉiujn materialojn disponeblis rete.

La plej granda tasko por mi tamen estis la verkado de projekto pri kunlaboro inter Eŭropo kaj Ameriko nome Kapablo-konstruado en la kampo de junularo kadre de Erasmus+. Ĝi certe estis la plej defia por mi, mi devis kontakti eblajn partnerajn organizojn kaj klopodi konvinki ilin partopreni la projekton. Mi gvidis la latinamerikajn partnerojn ekde la registriĝo ĉe la Portalo de partoprenantoj kaj kunordigis kun ili la diversajn ontajn agadojn de la projekto. Post preparo de buĝeto, detala priskribo kaj formularo, la projekton mi sendis fine de junio.

Nun, post 6 monatoj da laboro mi sentas multe pli komforta en la posteno kaj klopodos uzi ĉiujn miajn kapablojn kaj novajn spertojn por helpi atingi la celojn de TEJO.

Volontulo

raportas Jérémie Bert kaj Michal Matúšov (KuboF), volontuloj

La volontulo Paweł Fisher-Kotowski (Pollando) daŭrigis en sia posteno ĝis la duono de decembro 2015, kiam li estis anstataŭita de Jérémie Bert (Francio). La oficisto Mounir Abijou (Maroko) kaj Paweł mem prizorgis la transdonon de spertoj dum la komenco, sed ankaŭ per ofta reta komunikado

dum la sekva periodo. KuboF alvenis por komenco de sia volontulado per EVS la 18-an de Februaro 2016. Transdonadon de spertoj prizorgis precipe samtempa volontulo Jérémie, sed laŭokaze ankaŭ Paweł (dum tiu tempo laboranta en CO kiel UEA-oficisto) kaj retroŝte Mounir (en tiu tempo TEJO-oficisto).

La TEJO-volontuloj okupiĝas pri la ĉiutaga oficeja administrado kaj pri la kontaktoj ene kaj ekstere de la organizo. Tio inkluzivas la pritraktadon de la poŝto, papera kaj reta, kaj la respondadon al la demandoj kaj petoj de la membroj, aktivuloj aŭ eksteruloj. La volontuloj respondecas ankaŭ pri la komunikoj pere de la sociretaj kontoj de TEJO, kaj parte pri la publikigado de la novaĵoj en tejo.org. Krome, ili foje helpas al la laboro de estraranoj, komisiitoj kaj aliaj aktivuloj, plifaciligante la komunikadon inter ili kaj ankaŭ estante la ĉefa kontaktpunkto kun la CO en Roterdamo. Dum la fizikaj kaj retaj kunsidoj ili verkas la protokolojn kaj la taskolistojn.

Kadre de Pasporta Servo, la Oficejo havas kunrespondecon pri administrado de la retadreso de PS. Ĝi eventuale ankaŭ ricevas la paperajn aliĝilojn, kaj konsekvence traktas ilin, membrigante tiujn gastigantojn en la retpaĝon.

La volontuloj, plejparte KuboF, zorgis ankaŭ pri teĥnikaĵoj de TEJO. Gravaj aferoj tuŝis precipe la retejon, kie estis, krom aliaj, ŝanĝita registranto de TEJO-domajnoj kaj daŭrigita laboro pri transiro al nova servilo.

Du volontuloj ĉiutage agadraportas kaj ĉiumonate kontribuas al Komitata Cirkulero.

La volontuloj zorgas pri scitransdonado al sekvaj generacioj de volontuloj kaj pri ripetataj taskoj per preparado kaj ĝisdatigado de manlibroj kaj taskoskemoj en taskmastrumilo.

Koncerne la rilatojn inter la landaj sekcioj kaj TEJO, la volontuloj ĉijare partoprenis en la kolektado de informoj por la enketo KODEJO 2016. La respondoj al tiu ĉi enketo estis uzataj por ĝisdatigi la informojn pri TEJO kaj ĝiaj LSoj aperantajn en la Jarlibro de UEA.

La volontuloj partoprenis en la vivo de la Centra Oficejo de UEA kaj de tempo al tempo helpis pri komunaj, sed foje ankaŭ specifaj taskoj. Tial,

Ĵeremi voĉlegis artikolojn de la revuoj Esperanto kaj Kontakto por dissendo al blinduloj kaj regule zorgis pri ejoj de CO. La volontuloj zorgis ankaŭ pri teĥnikaĵoj de TEJO-oficejo, ekz. Jérémie, rekomende de Joop Kieft, aĉetis novan porteblan komputilon por la dua volontulo kaj vojaĝoj. La agadoj ene de la CO inkluzivis ankaŭ la partoprenon en la Malferma Tago, kaj la reprezentadon de TEJO tie. Ili ankaŭ ĉeestis nome de TEJO en kelkaj eventoj: Eŭropa Junulara Okazaĵo (kunorganizitan de la Forumo Junulara Eŭropa (EJO) 2016 en Eŭropa parlamentejo en Strasburgo, kaj diversaj EVS-trejnadoj. La volontulo reprezentas TEJO-n ankaŭ ene de la Esperanta komunumo, okaze de diversaj aranĝoj.

Dum la JES 2015 en Eger kaj JES 2016 apud Hamburgo, Ĵeremi' aranĝis kaj aranĝos TEJO-standon por doni informojn al la partoprenantoj kaj kolekti membriĝojn kaj abonojn.

Aldone, komencsomere okazas preparoj por la someraj aranĝoj, precipe la IJK en Vroclavo, kie interalie kunvenos la Komitato de TEJO, kaj la UK en Nitro, kie la deĵoranta volontulo kunprezentos TEJO-n kaj akceptos la Patronojn de TEJO.

La volontuloj, kuraĝigataj de la programo Erasmus+ komencis labori pri sia propra volontula projekto enkadre de sia deĵora tempo. KuboF dume komencis du projektojn. En la unua li daŭrigas iaman laboron pri Wikipedia multlingva informa kampanjo „Esperanto125“, kiun li nome de la laborgrupo Esperanto kaj Libera Scio kaj kunlabore kun la Komisiono de TEJO pri Informado partoprenis jam antaŭ sia volontulado. Dua propra projekto de KuboF informas pri landoj kaj urboj de renkontiĝoj de junuloj per Vikivojaĝoj. Li havas preparitajn plurajn proponojn pri kiuj li eventuale komencos labori post someraj renkontiĝoj.

Mallongigoj

AMO	Aktivula MaturigO
BEST	Board of European Students of Technology (<i>Eŭropa Konsilio de Teknologiaj Studentoj</i>)
CO	Centra Oficejo de UEA/TEJO (Roterdamo)
COP21	Klimatkonferenco de la Unuiĝintaj Nacioj de 2015
EACEA	Education, Audiovisual and Culture Executive Agency (<i>Eduka, Aŭdvida kaj Kultura Plenuma Agentejo</i>) de EU
EJO	Eŭropa Junulara Okazaĵo
EVS	Eŭropa Volontula Servo
FoJE	Forumo Junulara Eŭropa
IKRJO	Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj
IJF	Internacia Junulara Festivalo
IJK	Internacia Junulara Kongreso
ISAE	Internacia Scienca Asocio Esperanta
JES	Junulara Esperanto-Semajno
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
KODEJO	Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj
LS	Landa Sekcio
NED	National Endowment for Democracy (<i>Nacia Subvencio por Demokratio</i>)
NOVA	Novjara Aranĝo
TAKE	TutAmerika Kongreso de Esperanto
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

UEA	Universala Esperanto-Asocio
UN	Unuiĝintaj Nacioj
UNDP	UN Development Program (<i>UN-evoluigprogramo</i>)
WOSM	World Organization of the Scout Movement (<i>Monda Organizo de la Skolta Movado</i>)